



4

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

APRILIO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * Universala kongreso de Esperanto en Sofio	1
* * * XXXV kongreso de BEA	2
Jarkunvenoj de la societoj	3
Boris Drenski. Societo „Marek“ deklaras antaŭkongresan kon- kuradon	6
Ŝterjo Kukuŝev. Pri la esperantistoj agronomoj	7
Atanas D. Atanasov. Sesa leciono	8
Dončo Ĥitrov. Kino-festivalo en Budapeŝto	9
Krástjo Sofroniev. 60 jaroj da Esperanto en Plovdiv	10
Edwarda Kaminska. Malfermita letero al bulgaraj esperantistoj	12
Ivan Sarafov. „Privelegia vojo al lingvoscio-esperanto“ de Vilho Setälä (recenzo)	12
D-ro Mihail Popov. Vera pruvo	13
Nevjana Stefanova. Estonteco (versajo)	14
Tra la gazetaro	15
Ŝako	16

Abonkoto: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanconcoj: 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa,
Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6,
Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23,
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, București-5

SOVETUNIO: Jvan Palkin, Mitnaja ul. 52/54,
kv. 19, Moskva, B-162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SOFIO

Laŭ invito de la sofia societo „Maksim Gorkij“ kaj BEA Universala Esperanto-Asocio decidis okazigi la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto en 1963 en la bela ĉefurbo de Bulgario — Sofio. Ne estas necese emfazi la grandan ĝojon de la bulgaraj esperantistoj pro tiu eksterordinara sciigo. Unuan fojon en nia lando okazos internacia Esperanto-kongreso. Unuan fojon la bulgaraj esperantistoj havos la eblecon demonstri sian organizitecon kaj forton sur vasta internacia kampo. Sed ne unuan fojon ili invitas la kongreson. Tia invito kaj decido pri okazigo de UK estis ankaŭ dum 1924. Sed la reganta tiam faŝista bandaĉo malhelpis al la efektivoigo de tiu ĝoja festo esperantista. Ja la esperantistaj ideoj pri paco kaj demokratio ne konformis al la tiama diktatoreca reĝimo de teroro kaj sango. Nun la popolo estas vera mastro de sia lando kaj ĝi libere povas elmontri sian volon kaj aspirojn. Pro tio ni ekhavis eblecon inviti kaj organizi kiel ni volas universalan kongreson. Eĉ pli — ni havas la ĉiuspecan helpon de nia registaro. La kongreso okazos sub la aŭspicio de la prezidanto de la Ministraro.

Tiu ĉi UK havos grandan signifon por nialanda movado. Ĝi konvinkos la lastajn skeptikulojn pri la praktika valoro de Esperanto. Ja la Esperanto-kongresoj estas la unikaj internaciaj renkontigoj, en kiuj diversnaciaj homoj el la tuta mondo interparolas sen la helpo de tradukistoj kaj multekostaj tradukinstalaĵoj. Sed ĝi stimulos ankaŭ la disvolvon de la najbarlandaj movadoj.

La bulgaraj esperantistoj distingiĝas per sia idealismo kaj fervoro. Ili havas la ambicion organizi unu el la plej brilaj kongresoj en la historio de la monda Esperanto-movado. Sed pri tio estas necesa forta streĉo de la volo kaj la energio. Modela organiza disciplino estas nepre kondiĉo pri tio. Centoj kaj miloj da bulgaraj esperantistoj strebos al partopreno en la UK. Sed ni ne povos ne-konsideri la lingvo-konon. Pro la atendata granda nombro de aliĝontoj estas tre verŝajne, ke ni povus limigi la partoprenon de la bulgaraj esperantistoj. La permesata nombro de kongresanoj por la Universala Kongreso de ĉiu societo certe estos en rilato al la nombro de la ties membroj. Estos akceptataj nur aktivuloj, bone regantaj la lingvon. El tio sekvas du konkludoj: 1) unua tasko de la societoj devas esti la konsiderinda organiza plifortigo; 2) la societoj devas plani kaj organizi diversajn aranĝojn por plialtigo de la lingva nivelo de la gesocietanoj.

La tempo marŝas rapide. Ni ne prokrastu eĉ per unu tago la ekpreparon. Ni organizu tiel la kongreson, ke pri ĝi parolu kun admiro kaj kontentego la partoprenintoj!

XXXV KONGRESO DE BEA

LOKA KONGRESA KOMITATO

PRI LA KONGRESKOTIZO

Burgas. Je la 8-a de marto okazis pri-kongresa kunveno, kiun partoprenis 45 gesocietanoj. La sekretario de la asocio Violin Oljanov informis la kunvenon pri la lastaj decidoj de CK pri la kongreso kaj starigis la taskojn de la societo-kongresmastro. La societanoj montris grandan intereson kaj direktis multajn demandojn al k-do Oljanov.

La kunveno elektis la jenan Lokan Kongresan Komitaton:

Prezidanto: Vâlčo Minev — prezidanto de la Urba Popola Konsilantaro.

Vicprezidanto: Boris Golemanov — direktoro de la ekonomia lernejo.

Sekretario: Argir Andonov.

Membroj: Panajot Vlasev — sekretario de la Urba Komitato de BKP, Veska Darakčieva — respondeca pri la nutrado, Niko Pehlivanov kaj Kirjak Konstantinov — pri la enloĝigo, Anastas Čalâkov kaj ing. Trendafil Trendafilov — pri la propagando, Nikola Vasilev — pri ekskursoj, Nikola Vâlkanov — kasisto.

LKK akceptis agadplanon. La aliĝiloj jam estas dissenditaj al la societoj, de kie ĉiu esperantisto povas liveri al si.

VETURADO KUN RABATO

La kongresanoj veturos per rabato de 30% per la fervojoj, montrante la kongreskarton. Grupoj de pli ol 14 personoj povos veturi kun turista rabato de 50%.

LA EKZAMENOJ

La regularon ni ne povis publikigi en tiu ĉi numero, ĉar la Instruista Sekcio (Ĥesapčiev, Sarafov) ne prezentis ĝin al ni. Ni esperas, ke por la venonta numero ni ricevos ĝin kaj povos ĝin sciigi al la legantoj. Ni petas ties pardonon.

Oni demandas nin pri la kongreskotizo de la gejunuloj. La kotizo estas egala por ĉiuj kategorioj de kongresanoj. Nur la infanoj ĝis 14-jara aĝo kaj eksterlandaj esperantistoj ne pagas kongreskotizon. Sed tiuj ankaŭ sendas aliĝilon. Ili ricevas kongreskarton.

LKK apelacias ne prokrasti la sendadon de la aliĝiloj. Ju pli frue, des pli bone. La kongreskartoj estos dissendataj al la aliĝintoj tuj. Ĉion direktu al: Esperanto-kongreso, p. k. 138., Burgas.

PRI LA FAMILIANOJ DE LA ESPERANTISTOJ

Oni demandas nin, ĉu povas aliĝi al la kongreso edzino de esperantisto, kiu ne estas membro de la asocio. Jes, al la kongreso povas aliĝi familianoj de asocioj, kvankam ili mem ne estas membroj de la asocio. Tio rilatas al: edzo, edzino, gefiloj, gepatroj. Sur la aliĝilo de tia kongresano, anstataŭ la konfirmo de la membreco kaj de la numero de la membro-karto, la societa estraro skribas: „edzino (filo, filino)“ de ... Tia aliĝilo estas sendebla kune kun la aliĝilo de la membro. Tiaj kongresanoj — ne membroj pagas la saman kongreskotizon.



Stara Zagora. La 27-an de decembro 1961 okazis la jarkunveno de societo „Verda Stelo“. La estrara raportoj montris konsiderindajn sukcesojn, atingitajn dum la pasinta jaro. Preskaŭ duobligis la membraro kaj abonataro al „Bulgara Esperantisto“. La societo konkeris grandan aŭtoritaton kaj socian rekonon en la urbo dank' al sia diversflanka kaj publike diskonigita agado, nome amasa partopreno ĉe popolaj manifestacioj, organizo de brigadoj, helpe al la agrikulturaj kooperativoj, kolekto de paperaj kaj feraj restaĵoj ktp. La societo ricevis klubojn kaj multe plibonigis ĝia financa stato dank'al subvencioj de la Urba Konsilantaro kaj de kelkaj uzinoj, samkiel rezulte de la organizado de multaj kursoj, kolekto de papero ka.

Nesufiĉa oni konsideris la organizan kaj klerigan agadon de la societo. La junulara grupo ne agis kiel kolektivo por aligo de pli multaj gejunuloj al la societo, ne sukcesis krei vigan junularan vivon en la societa kluboj. Neglektata estis la kampanjo por disvendo de la markoj-brikoj por esperantista domo en Sofio.

La akceptita rezolucio signas la ĉefajn taskojn dum 1962 j. kaj respegulas la ambicion de la esperantistoj el St. Zagora — konkeri la unuan lokon en la Organiza konkurado de BEA. La novelektita estraro en sia unua kunsido ellaboris kvarmonatan planon kun konkretaj iniciatoj por la plenumo de la decidoj de la jarkunveno. En St. Zagora Esperanto estas en supreniro. La laŭplana laboro de sperta estraro kaj agema membraro estas garantio pri novaj sukcesoj dum 1962.

Inĝ. D. Dobrev

Pleven. La jarkunveno de la loka Esp.-societo „Eterna amikeco“ okazis en la societa klubo, en kiu estis aranĝita ekspozicio pri la korespondado de la membroj. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 geesperantistoj. La raportoj de la estraro analizis al aktualan internacian situacion, niajn sukcesojn en la socialisma konstruado. Ankaŭ la esperantistoj el Pleven agis kun konscio pri sia socia respondeco kaj konforme al la decidoj de la Plenkunsido de CK de BEA okazinta dum junio 1961. Grava atingajo de la societo dum la pasinta jaro estis la brile sukcesinta ekspozicio, vizitita de pli ol 3000 gesticivitoj el la urbo kaj la distrikto. Pli-grandigis la societa membraro, kies plimulto estas junuloj. El la junuloj sin bakas spertaj aktivuloj, ekz. la kurson por komencantoj en 3-a gimnazio komencis gvidi k-do Zdr. Velikov, sed post kvin lecionoj la instruadon transprenis P. Nikolov — lernanto en la sama gimnazio kaj estrarano de la societo. Dum la

jaro kreskis nombro de la abonintoj por B. E. de 40 al 55 kaj ankaŭ tiuj por la aliaj gazetoj.

Dum la diskutoj oni substrektis la mankon de lernolibroj kaj de esperanto-bulgara vortaro. Oni kritikis CK de BEA pri nekontentiga helpo.

En la novelektita estraro, krom la malnovaj aktivuloj, eniris du novaj membroj.

P. Stojanov

Pazarĝik. La jarkunveno de societo „Radio“ estis malfermita per magnetofona literatura kaj muzika programo. Pri la societa agado dum 1961 raportis la sekretario P. Arnaudov. Oni diskutis pri nomigo de esperanto-strato en Pazarĝik, pri la societa biblioteko kaj ankaŭ proponojn pri organizo de distrikta renkonto. K-do St. Kukuŝev el Peŝtera, kiel reprezentanto de CK de BEA eldiris valorajn pensojn pri la nuna internacia politika situacio kaj pri la ebla kontribuo de la esperantistoj en la porpaca batalo. La kunveno elektis novan estraron kun prezidanto Iv. Vasilev kaj sekretario P. Arnaudov, revizian komisionon kaj estraron de la junulara grupo kun prezidanto Iv. Piliĉev. Oni nomis ankaŭ korespondantojn de B E kaj de la loka ĵurnalo.

Rosica Georgieva

Kolarovgrad. La jarkunveno de la urba societo „Vekiĝo“ estis inaŭgurita per eta literatura programo de la lernantinoj-kursaninoj de nia kursgvidantino R. Kasabova. La estrara raportoj traktanta la unujaran agadon de la societo, estis sufiĉe analiza kaj kritika. Grava sukceso dum tiu periodo estas la fondo de Esp.-grupo en la maŝinkonstrua uzino kaj ankaŭ la kursoj en diversaj entreprenoj, ekz. ĉe legejo „Napredak“. Tamen samtempe oni markas malplivigigon de la membraro. Tute speciale la junuloj el la uzina grupo komencis malofte vizitadi la klubojn, kio rezultas ankaŭ malkreskon de la agado inter junularo en la urbo. Eĉ la jarkunveno ne estis bone vizitita. Oni proponis plivastigi la propagandon pri Esperanto per la paĝoj de la loka ĵurnalo. Celante lingvan perfektigon oni antaŭvidas organizi lego- kaj tradukkonkursoj. Por garantii la pli oportunan uzadon de la societa libroaro kaj la pli bonan konservon de la libroj, la kunveno decidis transdoni ilin provizore al legejo „Napredak“. Oni kritikis CK de BEA pro nesufiĉe efikaj ligoj kun la societo. Rezultas de tio la societo ne povis partopreni en la ekskurso al Odeso.

La kunveno sendis protestotelegramon kontraŭ la maljusta aresto de la pasia batalanto kontraŭ la koloniismo, la vicprezidanto de la ministraro de Respubliko Kongo — A. Gizen-ga al la sekretario de UNO kaj al la ĉef-ministro de Kongo — S-ro Adula.

Ilia Andreev

Stanke Dimitrov. La jarkunveno de societo „Marek“ k. j. pasis en entuziasma atmosfero. La jarraporton de la estraro tralegis la prezidanto B. Drenski. Nia societo laboras laŭplane por disvastigo de Esperanto en la regiono. Grandan intereson inter la urbanoj vekas niaj ekspozicio-vitrinoj. Oni organizis kursojn en la urbo kaj en minista urbeto Bobov Dol. Por la Zamenhofa datreveno ĉi-jare ni utiligis la senditan de CK de BEA prelegon, kiu tre bone analizas la meritojn de la kreinto de la lingvo kaj same liajn idealismajn iluziojn. La jarkunveno elektis novan estraron kun prezidanto — Boris Drenski kaj sekretario — Kr. Veliĉkov.

Dum sia unua kunsido la novelektita estraro ellaboris planon por la agado kaj decidis esprimi dankon al k-doĵ P. Stojanov kaj K. Antonov por ilia modela gardado de la arkivo kaj dokumentoj de la societo kaj arango de la societa biblioteko. Foliumante la riĉan arkivon de la societo oni povas trastudi la tutan historion de la preskaŭ ĉiam vigla Esperanto-movado en nia urbo. La unua Esp.-societo „Suno“ en nia urbo estis fondita de 13 entuziasmuloj dum 1910 j. Post la milito en 1920 estis fondita la junulara esperantista grupo „Rila Verda Stelo“, gvidata de la mortinta antaŭ nelonge eksinstruisto Ĉomakov. Multaj dokumentoj pruvus pri vigla agado dum tiu periodo. Oni regule kontaktis kun la sofia societo kaj en la lastaj jaroj kun la asocio. En la jaro 1933 la polico arestis la estraranojn kaj la movado ĉesis ekzisti. Nur post la 9-a de sept. 1944 oni denove renovigis la societon sub la nuntempa nomo „Marek“.

Iv. Dobrovski

Tolbuhin. En la sindikata domo „D. Blagoev“ societo „Paco“ okazigis sian jarkunvenon. Ĝi estis malfermita per konvena arta programo de la pioniroj-esperantistoj el lernejo „Hristo Smirneniski“. Oni tralegis ankaŭ saluttelegramon de la societo en Varna.

En la raporto estis substrekite, ke dum la forpasinta jaro kreskis la membraro de la societo kaj la abonintoj al la asocia organo. Pasis sukcese du Esperanto-kursoj por civitanoj kaj 4 por lernantoj. Nun funkcias 4 kursoj. En la eldiroj oni kritike analizis la mankojn en la laboro de la societo. Ĉiuj unuanime substrekis la akran bezonon pri klubejo kaj la kunveno devigis la novan estraron agi tiurilate kun plenaj fortoj.

La 29-an de januaro en vilaĝo Smolnica, distrikto de Tolbuhin la esperantisto-instruisto Iv. Bajĉev fondis novan E.-societon. Ĝi estas la dua Esp. societo en nia distrikto kaj en Dobruĝa.

Slavĉo Ŝijakov

Karlovo. La jarkunveno de societo „V. Levski“ okazis dum januaro k. j. Raporton pri ĝia unujara agado legis la prezidanto Angel Tanev. Nia societo havis regulan organizan vivon kaj ĝia tuta agado estis disvolvata laŭplane. Tamen ne ĉiam la planoj estis plenumataj. Ekzemple anstataŭ la projektitaj 3 kursoj por komencantoj efektiviĝis nur unu. La kunveno pridiskutis la mankojn en la agado kaj rezulte akceptis rezolucion, laŭ kiu nia societo devas daŭrigi la laŭplanan organizan vivon, malfermi kursojn, disvastigi la kontaktojn kun la aliaj kulturklerigaj organizaĵoj, aranĝi bibliotekon, plivigligi la internacian kolektivnan korespondadon, plifortigi la medicinan sektion kaj tute speciale — la junularan grupon.

Ni planas dum la kuranta jaro festi la 50-an datrevenon de la fondiĝo de la unua lernanta E.-societo „Ni Venkos!“, kies heredanto nun estas societo „Vasil Levski“. Ĉeestantaj malnovaj esperantistoj — ing. N. Nedelĉev, N. Borimeĉkova rakontis interesajn rememorojn de la iama tempo kaj direktis flaman alvokon al la ĝejnuloj.

Cv. Cvetkov

Levski. La jarkunveno de societo „Trum-petisto“ okazis en la salono de la loka muzika skolo. La artan programon partoprenis lernantoj el la skolo kaj aliaj gekamaradoj kiuj muzikis kaj recitis en Esperanto. En la raporto oni substrekis, ke la societo sukcesis organizi kelkajn propagandajn artajn programojn en la urbo kaj en vilaĝo Umarevci, kiuj bone efikis. Dum la jaro, vizitis la societon ankaŭ kvar gastoj el fremdaj landoj, kiuj estis varme renkontitaj. La kunveno elektis novan estraron kun prezidanto Donka Gavralova — sekretariino de la Komsomolo en la urbo.

Kina Uzunova

La lasta limdato por pago de la membro-kotizo al la asocio estas la 10. V. 1962.

Tuj pagu ĝin por havi rajton partopreni la kongreson per delegitoj.






Antaŭbalota slogano en Târnovo



Kunveno de societo „M. Gorkij” en Jambol



LA ESPERANTISTOJ — KUNE KUN LA POPOLO

Jambol. Kune kun la aliaj enloĝantoj la preparon de la antaŭstarantaj balotoj aktive partoprenis ankaŭ la lokaj esperantistoj. La 18-an de februaro k. j. ili kunvenis en la klubo de la societo por aŭdi kamaradon Marĉo Marĉev — regiona prokuroro, kiu parolis pri la demokrateco de nia balotsistemo. K-do Bojan Kuŝev, longjara esperantisto rakontis rememorojn pri la balotoj dum la Cankov'a reĝimo, kiam per perforto kaj mensogo oni falsigis la popolan volon.

St. Popov

Ruse. La 9-an de februaro la loka Esp.-societo „Libero” okazigis antaŭbalotan kunvenon, dum kiu raportis la prezidanto de la societo D. Kolarov. Li parolis pri la signifo de la balotoj, pri la sukcesoj, atingitaj de nia popolo dum la jaroj de la popola regado.

M. Preslavska

SUKCESA LERNEJA KURSO EN PEŜTERA

Por unua fojo en la mezlernejo en Peŝtera de la instruisto Sava Paunov estis organizita kurso de Esperanto. Dudek ses pioniroj kaj komsomolanoj studas la internacian lingvon, okupiĝante pri ĝi kun granda intereso. Ili jam korespondas kun amikoj el ĉiuj kontinentoj. La kurso eldonas propran murgazeton kaj antaŭ nelonge prezentis sian muzikprogramon antaŭ la urba radioservo. En la fino de la kurso, dum aprilo, la lernantoj estos solene akceptataj kiel membroj de la loka Esperanto-societo „Nova epoko”.

S. Paunov

KUNE KUN LA KOMSOMOLO

Pazargik. La 26-an de januaro la distrikta komitato de la Komsomolo kaj Esp.-societo „Radio” kune aranĝis amuzvesperon, kiun partoprenis aktivuloj-komsomolanoj el la distrikto de Pazargik kaj esperantistoj el la urbo. Kun kelkaj vortoj pri la internacia lingvo, k-dino R. Georgieva malfermis la vesperon. Gimnazianoj kantis viglajn popolajn kantojn. La plej junaĝa esperantistino Krasimira Krăsteva—lernantino en la III-a klaso deklamis en Esperanto. Sian propran versaĵon „Bonvenigo” — al la gejunuloj gastoj recitis R. Georgieva. Same recitis la lernantinoj M. Belĉeva kaj Iv. Dimitrova. La esperantistan programon kaj ekspozicion organizis k-doj P. Arnaudov kaj Iv. Piliĉev.

La amuzvespero pasis en kamaradeca gaja atmosfero. Multaj komsomolanoj por unua fojo aŭskultinte esperantan paroladon ekinteresigis pri la internacia lingvo.

Rosica Georgieva

SOCIETO „MAREK“ DEKLARAS ANTAŬKONGRESAN KONKURADON

La societo „Marek“ en urbo St. Dimitrov deklaras antaŭkongresan konkuradon al ĉiuj societoj en la lando pri la jenaj punktoj:

- 1) Kolekto de la membro-kotizo kaj akurata transsendo al BEA.
- 2) Procenta nombro de la abonintoj al „Bulgara Esperantisto“.
- 3) Nombro de la novaj membroj, varbitaj dum 1962.
- 4) Nombro de la kursoj por komencantoj kaj nombro de kursfinintoj.
- 5) Planado kaj regula okazigo de la kunsidoj de la societa estraro kaj akurata preparo de protokoloj pri tiuj kunsidoj. Plenumo de la decidoj.
- 6) Nombro de korespondaĵoj pri la societa vivo por „Bulgara Esperantisto“ kaj aliaj gazetoj.
- 7) Arango kaj prizorgo de la societa biblioteko, arkivo kaj librotenado.

B. Drenski



Gelernanta esperantista ensemblo en Kazanlák



PRI LA ESPERANTISTOJ- AGRONOMOJ

Dum la lastaj jaroj dekoj da agronomoj studante en la superaĵ agronomiaj institutoj havis la eblecon fariĝi esperantistoj.

Ofte mi havas la plezuron interŝanĝi leterojn en Esperanto kun bulgaraj kaj eksterlandaj kolegoj-agronomoj. Ni ĉiuj kiel specialistoj havas intereson plibonigi niajn sciojn, ni revas pri agronomia fakterminaro, gazeto, libroj en Esperanto.

Nature jam ekzistas agronomiaj libroj, folioj ka. en Esperanto de prof. P. Neergard, St. Booit, O. Pancer ka. Sed, se ni deziras abundan profesion literaturon, ni devas unuigi niajn fortojn kaj vicojn. Antaŭ nelonge mi havis bonan kontakton kun la Miĉurina Agronomia Instituto en urbo Miĉurinsk en USSR, kie mi studas en ronda formo la internacian lingvon. La samajn interesojn havas ĉiuj studentoj agronomoj de diversaj landoj.

La intereso en eksterlando pri la sukcesoj de nia socialisma agrikulturo estas granda. La agronomoj povas esti neoficialaj. La vilaĝanoj kaj la specialistoj de aliaj landoj serĉas nin, kaj ni estas senperaj agantoj en ŝtata aŭ kooperativa agrikultura entrepreno. Uzante Esperanton mi korespondas kun agronomoj de USSR, Pollando, Hungario, ĈSSK, Ĉinio, Vjetnamio, Brazilio ka.

Ofte mi legas krom literaturaj kaj aliaj artikoloj ankaŭ interesajn artikolojn pri agronomiaj problemoj en gazetoj „Nuntempa Bulgario“, „El Popola Ĉinio“, „Vjetnamio antaŭenmarŝas“, „Kulturaj kajeroj“ ka.

Antaŭ ni estas la statistika listo de la socioj de BEA kaj ni konstatas ke 39 esperantaj societoj estas vilaĝaj aŭ proksimume 35% de ĉiuj societoj en la lando. La granda parto de bulgaraj agronomoj, unu armeo de specialistoj de pli ol 5 000 personoj vivas kaj laboras en la vilaĝoj. Ili havas la senperan kontakton kun la vilaĝa junularo kaj intelektularo, kiuj ankaŭ interesiĝas pri Esperanto. La agronomoj plej facile kaj plej efike povas propagandi nian aferon inter la vilaĝana junularo. Mi ricevas leterojn de tiaj junuloj el diversaj agrikulturaj entreprenoj de nia lando kaj de aliaj landoj, ekzemple de Siberiaj kolhozoj kaj sovhozoj de USSR.

La plej bona helpanto kaj aktivulo de nia movado en la vilaĝo kaj agrikultura lernejo estas la bulgara esperantisto-agronomo.

Mi proponas al ĉiuj, kiuj havas agronomian profesion superan aŭ mezan nepre skribi al mi pri la menciita problemoj. Estonte ni pri-

PETO AL ĈIuj BULGARAJ ESPERANTISTOJ

En 1889 M. S. Bogdanov eldonis lernolibron de Esperanto. En decembro 1889 li komencis eldonadon de gazeto „Mondlingvisto“ en bulgara lingvo kaj en Esperanto. Aperis tri numeroj. En junio 1891 Bogdanov daŭrigis gazeton sub titolo „La Espero“; verŝajne aperis nur unu numero, la 4-a, en 8 paĝoj.

Ni petas ĉiujn bulgarajn esperantistojn traserĉi ĉiujn naciajn bibliotekojn pri la lernolibro kaj la gazetoj de M. S. Bogdanov kaj pri trovo tuj informi la redakcion de „Bulgara Esperantisto“. Se iu sukcesos trovi ion, ni volus havi fotografiaĵojn: a) de titolpaĝo de la lernolibro de M. S. Bogdanov; b) de unuaj paĝoj de „La Mondlingvisto“ kaj „La Espero“.

Ni speciale petas la esperantistojn en Târnovo, Varna, Plovdiv, Kazanlâk, Ruse, Kolarovgrad, Bjala Slatina, Stara Zagora, Silistra ka. traserĉi pli detale en siaj urbaj bibliotekoj kaj ni esperas, ke iuj sukcesos en la grava tasko trovi iujn el la serĉataj presaĵoj.

La Asocio aĉetus ĉiajn malnovajn eldonaĵojn kiuj prezentas bibliografian maloftaĵon, inkluzive de „Bulgara Esperantisto“ — jaroj 1919—1942.

**Membroj de UEA kun jarlibro
povas estiĝi ĉiu bulgara esperantisto. Sendu tiucele 2,44 lv
al BEA, p. k 66, Sofio.
Abonoj al gazeto Esperanto
jam ne estas akceptataj**

pensu pri la formo de la organizado, gvidado kaj helpo al agado de la esperantistoj-agronomoj en nia movado.

Agr. Ŝterjo Z. Kukuŝev
Faklernejo („Teknikumo“) de Tabako
Str. „Oboriŝte“ 15 — Peŝtera.

LA KURSANOJ

Nian Esperanto-kurson partoprenas 32 personoj de plej diversaj profesioj kaj aĝoj. Inter ili estas oficistoj, studentoj, gimnazianoj, metiistoj, laboristoj, unu kuracisto, unu pastro, unu oficio, du dommastrinoj kaj eĉ du junaj vilaĝanoj-agrokulturistoj.

Laŭ aĝo la kursanoj estas de 16- ĝis 60-jaraj.

Nature, ne ĉiuj kursanoj egale rapide povas kompreni la diversajn gramatikajn regulojn, tial ke ne ĉiuj estas egale inteligentaj. Estas kelkaj, kiuj malfacile lernas. Tamen neniu el ili malesperigas. Ĉiuj lernas plej fervore kaj diligente. La pli kleraj klarigas al la malpli kleraj la malfacilajn regulojn kaj tiel ili helpas la instruiston. Neniam mi vidis similan entuziasmon, kia regas en nia kurso.

Specialajn simpatiojn ĝuas la du vilaĝanoj. Ilia ĝojo pro tio, ke ili lernas kaj povas komprenigi sin per unu fremda lingvo, estas senlima. Prezentu nur al vi: por preni la lecionojn de Esperanto, tiuj ĉi bravaj knaboj devas marŝi piede la vojon inter sia vilaĝo kaj la urbo — kaj tion dufoje semajne!

Certe, vi demandos: kial do vilaĝaj knaboj bezonas Esperanton? Al mi tio estas tute klara: tial ke ĉiu homo deziras scii almenaŭ unu fremdan lingvon kaj plivastigi sian intelektan horizonton, ne stari kiel senparola besto aŭ kiel surda kaj muta homo en ĉeesto de alilandanoj. Por tiuj ĉi vilaĝaj knaboj Esperanto estas lumo, ĝi estas fenestro al la vasta mondo, ĝi kontentigas ilian soifon por pli vasta intelekta vivo. Jen kial ili lernas tiel persiste kaj kun lia ĝojo la internacian lingvon.

La kurson partoprenas ne nur bulgaroj: inter la kursanoj estas ankaŭ du hebreoj, unu turko kaj eĉ unu franco, kiu loĝas en nia lando. La hebreoj estas el la urbo Plovdiv, la turko el la urbo Kolarovgrad kaj la franco estas el Tuluzo. La Plovdivanoj kaj la Kolarovgradano estas en konstanta konkuro: ĉiu havas ambicion atingi pli brilan sukceson, kio distingas ankaŭ iliajn urbojn, kiuj en la antaŭaj jaroj ludis gravan rolon en la Bulgara Esperanto-Movado. Sed la tuluzano ne postrestas: lia ambicio estas ja distingi sian nacion!

La hebreoj kaj la turko estas niaj samlandanoj, kvankam ne niaj samnacionoj. La franco estas alilandano kaj alinaciano.

Tio ne gravas: ni ĉiuj ja estas samideanoj!

KORELATIVAJ VORTOJ:

NENiu, NENio, NENia, NENie, NENiam, NENiom, NENiel

kiu, tiu, ĉiu, **nenu**.

kial? (pro kio, pro kia kaŭzo?), tiAL, ĉiAL, neniAL.

Kial la afero ne prosperas? — Ĉar ĉiuj ordonas kaj nenu laboras.

Ĉar

Tial ĉar

Pro tio ke

Tial ke

ĉiu komandas kaj nenu laboras.

NOTO. — Por kelkaj nacioj (speciale por la slavaj) estas bezone atentigi, ke en Esperanto sufiĉas **nur unu nea vorto** (ne, nenu, nenie, neniam, ktp.) por nei la penson en la propozicio (en la bulgara lingvo estas en tiu kazo du neaj vortoj). Do oni atentu ke estas

Korekte

Nenu venis
Nenie mi vidis lin
Mi forgesos neniam
Nenio okazis

Nekorekte

Nenu ne venis
Nenie mi ne vidis lin
Mi ne forgesos neniam
Nenio ne okazis

SUFIKSO

AN signifas loĝanton, membron, adepton de tio, kion esprimas la radikvorto:
URB-AN-O: homo kiu loĝas en urbo.



SOFI-AN-O : homo kiu loĝas en Sofio.
 PARIZ-AN-O : homo kiu loĝas en Parizo.
 GRUP-AN-O : membro de grupo, ano de grupo.
 SOCIET-AN-O : membro de societo.
 Kristo, KRISTANO : adepto de la instruo de Kristo.
 Islamo, ISLAMANO.
 Samurbano, SAM-URB-AN-O : homo kiu loĝas en la sama urbo.
 SAM-VILAĜ-AN-O, Samlandano, Samnaciano.
 Samideano, SAM-IDE-AN-O : adepto de la sama ideo.

NOTINDAJ VORTUZOJ

Partopreni : preni parton (de io, en ia afero) : mi partoprenos la ekskurson, la kongreson.
 Postresti : resti post iu alia, resti malantaŭe.
 Ne gravas : ne estas grave.

EKZERCOJ

1. Kial vi vizitas la Esperanto-kurson ? — Ni vizitas la Esperanto-kurson
 por . . .
 ĉar . . .
 tial ke . . .

2. Mi ne aĉetis la libron tial ĉar . . .
 Mia kuzo ne venis hieraŭ tial ke li . . .
 Ĉiuj ŝatas lin nur tial ke li . . .

3. Neni . . . el ni povos veni morgaŭ.
 Neni . . . kreskas tiaj belaj floroj, kiaj estas en ŝia ĝardeno.
 Neni . . . libro estas tiel malpura kiel la via.
 Mi neni . . . povas kompreni tion, kion vi diras.
 Ili havas neni . . . da pano.
 Neni . . . la suno brilis tiel gaje kiel en tiu tago.

KINO-FESTIVALO EN BUDAPEŜTO

La Centra hungara kinoamatora klubo sub la protekto de la Hungara Esperanto-asocio planas la organizadon de Unua Festivalo de esperantistoj kino- kaj fotoamatoroj el la danubaj landoj. Dum la Festivalo estos prezentitaj personaj kaj kolektivaj verkoj (filmoj kaj fotografaĵoj) de esperantistoj. La plej bonaj verkoj estos premiitaj. Dum la festivalaj tagoj estos ankaŭ organizita fotoekspozicio. Tiu ĉi iniciato celas krei veran internactin amikecon kaj pacaman kunlaboradon inter geesperantistoj kino- kaj fotoamatoroj.

Tiurilate la bulgaraj geesperantistoj kino- kaj fotoamatoroj plivigligis sian agadon. La Bulgara Esperantista kino kaj fotoklubo, kiu ekzistas deŝpost tri jaroj, aktivigis. Ĝi anoncis la okazigon de fotokonkurso, kiun povas partopreni ĉiuj esperantistoj el la lando, sendante fotografaĵojn (en dimensioj minimume 13/18 cm) al BEA, Sofio, Bulv. Dondukov 57. Limtempo por la sendo — 15. VI. 1962 j.

La fotoverkoj devas respeguli la socialisman konstruadon, naturbelaĵojn aŭ la esperantistan agadon. La plej taŭgajn fotografaĵojn oni ekspozicios dum la 35-a Kongreso de BEA en Burgas. Oni disdonos premiojn kaj same inter ili oni elektos le verkojn, per kiuj la klubo prezentigos en la Festivalo en Budapeŝto.

La filma sekcio de la klubo finverkas sian unnan filmeton — „La festo de la Rozoj“. Krom ĝi la kinoamatoroj preparas mallongan filmon kies artistoj estas pupoj. Per tiuj filmoj ni deziras partopreni en la Festivalo.

La magnetofona sekcio ankaŭ intencas surbendigi interesajn propagandajn kaj artajn programojn.

La Bulgara Esperantista kino- kaj fotoklubo invitas ĉiujn bulgarajn geesperantistoj subteni la agadon de la klubo.

Dončo Ĥitrov — Prezidanto
 de la klubo.

Kiel grava ekonomia loĝloko Plovdiv ĉiam estis centro, kie renkontiĝis la plej progresemaĵoj, kiuj emociis la homojn. La apero de l'intennacia lingvo Esperanto kvazaŭ malproksima eho tuŝetis la korojn ankaŭ de la viglaj loĝantoj de la urbo — ili emociiĝis, ke ĝi malkovros antaŭ ili eblecojn por komunikiĝo kun la laboruloj de la tuta mondo kaj per ardo, per amo ili komencis lerni ĝin.

Unua arda pioniro de la Esperanto-movado estis la poŝtisto Georgi Oreškov. Li lernis la lingvon per tia pasio, ke en 1900 j. kune kun Ĥristo Popov el Dolna Orjahovica, ili eldonis en Plovdiv lernolibron por la lernado de la lingvo en 10 lecionoj.

Cirkaŭ G. Oreškov rapide grupiĝis entuziasmaj junuloj kiel G. Atanasov, T. Kânev, R. Rajĉinov ka., kiuj lernis Esperanton kaj disvolvis vastan propagandan agadon inter la popolo por ĝia popularigo. La nombro de la esperantistoj pligrandiĝas kaj tio trudas la kreon de centro por organizita kaj celdirektita disvastigado de la lingvo.

La 15-an de februaro 1901 oni fondas la unuan esperantan klubon „Stelo“ en la urbo. Prezidanto oni elektas Petâr Ivanov, vicprezidanto — Nikola Bejnov, sekretario — Georgi Oreškov kaj bibliotekisto Koĉo Vinarov.

La kreita klubo komencas aktivan agadon. Oni faras prelegojn pri la signifo de Esperanto, pri ĝia gramatiko ka. En la konscio de la membroj de la klubo maturiĝas la ideo pri eldono de gazeto. Ili donas materialan helpon kaj dum februaro 1902 en Plovdiv aperas la unua ilustrita gazeto de la bulgaraj esperantistoj „**Rondiranto**“. Ĝi aperas kun moto: „La progreso estas vivo, la stagno — morto“.

Jam per siaj unuaj numeroj la gazeto ludas gravan rolon por la aktivigo de la Esperanto-movado en la urbo. En ĝi oni publikigas artikolojn pri la heroa historio de nia popolo, oni propagandas nian nacian kulturon kaj literaturon ka.

La klubo disvolvas vastan agadon por akcepto de novaj esperantistoj. La 16-an de marto 1903 en hotelo „Peterburgo“ oni malfermis la unuan kurson por lernado de la lingvo kun gvidanto G. Atanasov.

Favoran rolon por la aktivigo de la Esperanto-movado en la urbo ludis la malnova veterano de la Esperanto-movado en la lando Dimitâr Malĉev, kiu venis en Plovdiv en 1921. Amasiginta ne malgrandan sperton en sia praktika agado kiel esperantisto li rapide gajnas la korojn de multaj laboruloj. Speciale varme kaj kun senteme D. Malĉev estas renkontita en la klubo de la Bulgara Komunista Partio — la Popola Domo.

Kun la kunhelpo de la Komsomolo oni organizas kurson. En ĝi enskribiĝis 80 junuloj — Ivan Armin, Ivan Georgiev, Ivan Ĉarov, Georgi Buzdrev, Atanas Pavlov ka., inter kiuj estas ankaŭ la sekretario de la societo Kosta Mateev. La kurso finiĝis sukcese. Al la Junulara Komunista Organizaĵo oni fondis esperantan sektion, kiu disvolvis bonan agadon. Oni tradukis versaĵojn de Botev, oni gvidis vastan internacian korespondadon ka.

La 14-an de julio 1922 oni fondas esperantistan societon „Kulturo“. En ĝi aktive elmontriĝas P. Stoev, I. Ŝivarov, P. Petrov, S. Petrov k. a. Post la okazintaĵoj dum septembro 1923 kaj aprilo 1925 la bonaj rezultoj estas

malheligitaj: en la lando starigas kruela teroro kaj la Esperantista Societo „Kulturo“ ekvivis anemie.

Post la kreo de la Bulgara Laborista Esperantista Asocio en 1930, kiu komencis batalon por kunligo de esperanto kun la laborista movado, en Plovdiv estas kreita Laborista Esperantista Societo. Kiel klasa, batalanta organizaĵo, ĝi disvolvis vastan agadon inter la laboristaj amasoj — organizado de kursoj, arango de prelegoj, tradukoj de interesaj materialoj kaj aliaj.

La Laborista Esperantista Societo nombris 120 personojn. Ĉiaj membroj partoprenis aktive en ĉiuj antifaŝistaj arangoj. La polico vidis la aktivan agadon de la societo kaj ne ĉesis persekuti ĝiajn gvidantojn. Sed tio ne depremis la bataleman spiriton de la esperantistoj.

Post la 19-a de majo 1934 la ebalecoj por laŭleĝa agado elĉerprigis. La Laborista Esperantista Societo rapide reorganizis sian agadon kaj al la plifortigita polica teroro respondis per ankoraŭ pli aktiva laboro. En la fino de 1934 ekaperis en Esperanto „Ŝturmulo“ (stencilita). Pri ĝia redaktado kaj eldonado priokupis sin Hr. Marinov-Gorov, T. Sofroniev kaj K. Ĉiĉanov. Ĉi estis presata sur 6 kaj pli da paĝoj kun eldonkvanto 120 ekzempleroj. Ĝia presado estis farata en la domo de K. Ĉiĉanov. Aperis tute 13 numeroj.

La gazeto estis disvastigata ankaŭ fremdlande. Ĉi informas la mondan socion pri la politika stato en la lando, la kruela teroro sur la laboristaj organizaĵoj ka.

Ne post longe la polico malkovris la eldonadon de la gazeto kaj kondamnis je multjara malliberigo ĝiajn bravajn organizantojn.

La sekvontajn jarojn la laboristoj-esperantistoj denove eniris en la Esperantistan Societon „Kulturo“ kaj eklaboris en ĝi. Oni aranĝis kursojn, vi-

vantajn ĵurnalojn, ekskursojn. Ĉio ĉi kunhelpas la aktivigon de la junularo, por la konscio de ĝiaj klasaj interesoj kaj por ĝia altiro en la laboristajn organizaĵojn.

Kun fiero oni povas diri, ke la esperantista movado fariĝis lernejo por multaj junaj laboristoj, kiuj, trapasintaj ĝiajn vicojn, kunligiĝis kun la laborista movado kaj partoprenis aktive en la batalo por la forigo de la malaminda monarkofaŝista diktaturo. En tiu akra batalo fordonis sian vivon ankaŭ multaj esperantistoj, kiel K. Mateev, S. Veselinov, K. Atanasov, D. Surlev, la fratoj Vlado kaj Cvjatko Georgiev ka.

Post la Naŭa de Septembro 1944 la Esperantista Societo en Plovdiv eklaboris per novaj fortoj. En daŭro de 17 jaroj da libera ekzistado ĝi plenumis grandegan kultur-klerigan agadon. Ĉis nun estas aranĝitaj multaj kursoj, prelegoj, lekcioj ka. La nombro de la esperantistoj estas tre granda. La societo havas sian klubojn, kie ĝi gvidis varian agadon. Vastan svingon okupis la internacia korespondado. La esperantistoj en Plovdiv estas ligitaj kun la pli granda parto el la landoj en Eŭropo, Azio kaj Ameriko. En siaj korespondaĵoj ili rakontas al siaj fremdlandaj amikoj pri la heroeca batalo de nia popolo por la konstruo de la socialismo en nia lando.

Kr. Sofroniev

ВНИМАНИЕ !

Другари, при справки относительно неполучения броеве на списанието и промяна на адреси винаги съобщавайте АБОНАМЕНТИЯ СИ НОМЕР.

В пощенските записи отбелязвайте за какво се отнася изпратената сума. Напр.: БЕ, Ел. Ч., Чл. вн. Чл. к., Пацо и др.

Tre karaj gekamaradoj!

Kvankam mi troviĝas jam milojn da kilometroj for de via lando, mia memoro kaj varmaj sentoj estas ĉe vi. Akirinte en Bulgario multe da admirindaj geamikoj, mi iĝis pli riĉa spirito. Tiu ĉi konstato fierigas min, ĉar inter vi troviĝas verkistoj, redaktoroj kaj aliaj eminentuloj, kiuj dank' al sia valoro okupas respondecajn postenojn. Mi ege fieras, ĉar inter miaj novakiritaj amikoj troviĝas gelaboristoj. — la fundamento de ĉiu popolo.

Kiam mi estis rakontanta publike pri miaj travivaĵoj en hitleraj koncentrejoj, kvankam ekde tiu tempo jam pasis 16 jaroj, la sentemo kaj la kompato kaj samtempe la indigno de la aŭskultantoj estis granda. Tiam mi despli eksentis proksimecon, ĉar kunligas nin komuna porpaca batalo. Nia komuna celo estas atentigi la homaron, precipe la junularon pri minacanta danĝero de nova mondmilito.

En Plovdiv mi sentis min kvazaŭ hejme. Mi neniam forgesos la okul-esprimojn de aŭskultantoj dum mia parolo en la klubo pri niaj travivaĵoj en hitleraj koncentrejoj — la tuta tragedio respeguligis en iliaj rigardoj.

Mi neniam forgesos la ĉarmajn infanojn-pionirojn de lernejo en Burgas.

Dankon knabineto, kiu kun flamo certigis min post mia raporto, en nomo de aŭskultantoj, ke vi despli batalos por paco. Dankon al kamarado direktoro de la supre menciita lernejo, kiu ebligis tuj fondi E-kursojn. Eble dum venonta UK en Sofio la infanoj partoprenos jam kiel esperantistoj?

Per tiu ĉi letero mi dankas al vi ĉiuj, karaj gekamaradoj, pro la belegaj tagoj travivitaj en Bulgario. Mi revenis hejmen pli vigla, gaja kaj ĉefe pli juna. Jes, pli juna, mi tute ne troas. Mi revenis hejmen kun novaj deziroj kaj apetito, ĉar la specifika bulgara manĝaĵo, kiu komence gustis iom strange, poste fariĝis bongusta, precipe mankas al mi „kebabĉeta“. Jes mi nepre devas reveni al Bulgario, ĉefe por plijuniĝi.

Finante ĉi leteron mi ne forgesu danki al la „Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando“ en Sofio, pro senditaj libroj, poeziaĵoj, kaj „Nuntempa Bulgario“, kiujn mi transdonis al nia Distrikta Estraro je ilia dispono. Dankon al la Gentra Komitato de BEA pro invito kaj zorga organizo dum mia estado en Sofio. Dankon al vi ĉiuj miaj karaj, geamikoj.

Ĝis revido en Bulgario!

Edwarda Kaminska

VERA PRUVO

Antaŭ nelonge vizitis nian landon la argentina sciencistino D-ro Rosa Skolnik el la universitato en Kordoba. S-rino Skolnik estas doktoro pri medicino kaj mondscale pristudas la sovaĝajn plantojn de la multspeca familio de la solanacoj (Solanaceae), al kiu apartenas tiaj gravaj plantoj, kiel la tomatoj, terpomoj, tabako kaj ankaŭ

multnombraj kuracplantoj, kiel la fama „atropa belladonna“, la skopolio, daturio kaj aliaj.

Mi konatiĝis kun s-rino Skolnik hazarde dum Esperanto-solenaĵo en Sofio. Eksciante, ke mi ankaŭ laboras en Biologia scienca instituto, ŝi esprimis deziron viziti la lastan.

Post kiam la direktoro de la Insti-

„PRIVILEGIA VOJO AL LINGVOSCIO-ESPERANTO“ DE VILHO SETÄLÄ

En 1960 aperis en Helsinko, Finnlando, nova lernolibro de Vilho Setälä kun originala titolo: „Privilegia vojo al lingvoscio-Esperanto“. En la antaŭparolo, titolita „Al la studgvidanto“, la aŭtoro diras, ke „la plej interesa kaj inteligenta maniero lerni lingvon estas studi ĝian literaturon. La sencon de novaj vortoj oni divenas el la kunteksto aŭ kontrolas per Plena Vortaro. Certe tio estas ĝenerale aplikebla nur post baza studado, kiam la novaj vortoj ne plu aperas tro dense“.

Do la libro volas esti enkonduko de tiu metodo. La novaj vortoj estas prezentataj per bildoj kaj simboloj, aŭ eksplikataj per jam lernitaj vortoj. La enhavo formas kontinuan rakonton pri aventuroj de la herooj, bestetoj (koko, kato, urso, porko, vulpo, ktp) kiel simboloj de homaj infanoj.

Kiam la lernanto finas la tutan lernolibron, li jam posedas vortprovizon de 1400 glosoj, li povas legi ordinaran romanon, en kiu li ne trovos pli ol 4% da novaj vortoj.

La libro estas uzebla ankaŭ por memstudado. Se oni gvidos kurson, oni povas kompletigi la studadon per parolekzercoj.

La prononco povas esti lernebla per magnetofona bendo, kiun oni povas ricevi ĉe la eldoninto de la libro aŭ ĉe la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo.

La tuta materialo estas dividita en 53 lecionojn. Ĉiuj lecionoj estas bone ilustritaj de Asmo Alho kaj Kylli Koski. En la fino de la libro estas vortklarigoj, alfabeto vortlisto kaj listo de gramatikaj elementoj. En la lecionoj oni donas la tutan esperantan gramatikon, ankaŭ enigmojn kaj proverbojn.

La formato estas malgranda kaj oni facile povas enpoŝigi la libreton.

La lernolibro havas 128 paĝojn.

La aŭtoro Vilho Setälä skribas en „Esperanto“ de UEA (junio 1961) en la artikolo „Lerni kun ĝojo“ jenon:

„Nun ni trovis kelkajn el la bazaj principoj de kuraĝiga lingvolernilo. Ĝi devas doni al ni intelligentan legaĵon en plej eble kontinua formo kaj en ĝia teksto la novaj vortoj devas aperi sufiĉe maldense“.

Poste la aŭtoro daŭrigas: „Multaj vortoj estas ilustreblaj per bildoj“. Kaj vere la bildo trege faciligas la lernadon de la lingvo.

Grava problemo estas pri la amplekso de la lernolibro. Oni scias, ke la minimuma kvanto da radikoj, necesa por la ĉiutaga uzo de Esperanto estas 500–600. Se vi volas esti plimalpli perfekta en posedo de la lingvo vi bezonas la konon de ĉirkaŭ 2000 radikoj. Por la privilegia vojo al lingvoscio la aŭtoro elektis la oran mezon 1300–1400 radikojn, ĉe kio la leganto de romano renkontas 3–4 nekonatajn vortojn en 100 tekstvortoj.

La aŭtoro skribas, ke „lernolibro de la internacia lingvo estas plene neŭtrala je la vidpunkto de kiu ajn filozofio, religio, politiko aŭ nacieco“, pri kio ni ne plene konsentas kun li.

La praktiko montras la bonajn kvalitojn de la lernolibro de V. Setälä. La lingvo estas bona, eraroj ne estas troveblaj.

Ni deziras al ĝi vastan disvastigon.

La libron liveras UEA en Roterdamo.

IV. SARAFOV

tuto kaj la sciencaj kunlaborantoj estis avertitaj pri la gastumo, ni aranĝis la renkonton kun D-ro Skolnik. Krom la Instituto pri Biologio ĉe la Bulgara Akademio de la Sciencoj, ŝi vizitis ankaŭ la Instituton de la Arbaro ĉe la Vilaĝmastruma Akademio, troviĝanta en la sama loko.

Kvankam D-ro Skolnik posedas krom la hispana ankaŭ la anglan, la francan kaj la germanan lingvojn, ŝi preferis uzi la internacian lingvon. La renkonto estiĝis bona demonstracio de la taŭgeco kaj vivkapablo de Esperanto, kiu

kvankam artefarita estas vivanta lingvo.

Al la sciencaj laboristoj en ambaŭ institutoj faris impreson la fakto, ke en Esperanto la interparoloj marŝis glate kaj flue, dume en la aliaj lingvoj okazis kelkaj embarasoj. Ili konvinkigis, ke Esperanto estas viva lingvo kaj tute kapabla servi ne nur en la ordinara ĉiutaga vivo, sed ankaŭ en la internaciaj rilatoj de la sciencistoj.

D-ro Mihail D. Popov,
supera scienca kunlaboranto en
la Bulgara Akademio de la Sciencoj

E S T O N T E C O

Ne scias mi kio vi estiĝos.
Elektu tion, kion volas vi.
Sed miaj noktoj estas pacaj noktoj —
efektivigas jam la rev' ĉe ni . . .

Estiĝu teksistin' — la landon vestu,
la nudigitan de la malamik'.
Kuracu aŭ konstruu, instruadu,
aŭ rozojn, pomojn kulturadu vi!

Estiĝu vi poeto — prikantadu
la digojn, kie floras jen la am';
el la minejoj rimojn elektadu —
sonorajn kaj forĝeblajn, el metal'. . .

Estiĝu pentristin' — per farboj-ondo
vidaĵojn pentru vi de nia la ter':
ĝi ĉarma estas kiel junulino
ruĝiĝis sub la nuna nova sun'. . .

Estiĝu dancistin' — per gestoj belaj
esprimu spacon kaj liberon jen:
samkiel lulas sin grenkampoj oraj
aŭ vento portas sin — printempa fen'.

Per farboj, sonoj, dancoj kaj en ritmoj
de la Libero vidon montru vi —
flugilojn donis ĝi al vi por flugi,
kaj ĝiaj spacoj estas ja sen fin'.

Laŭvole ĉio esti do vi povas,
ja kion volas por elekti vi. . .
Mi lasos vin. Sed mi nur unu volas,
ke nur pri tio min komprenu vi:

se pac' ankoraŭ ĉie do ne estas,
kaj estas nigro, suferoj, malbon' —
mi, kvankam tremas, revas ke vi restos
soldat' luktanta por la just' de l' hom'.

Estiĝu vi, Borjana, batalanto
por ĉiuj infanetoj de la mond'!
Ke ili havu la feliĉon nian
kaj kresku gaje, en kantanta rond'! . . .

Tradukis: Zora Mladenova



Meze de marto ĉi-jare la vicprezidanto de BEA k-do Atanas Lakov vizitis la esperantistajn societojn en la urboj Stanke Dimitrov, Blagoevgrad kaj Kjustendil. En tiuj urboj li renkontigis kun la estraroj de la lokaj societoj. Estis pritrakitaj vico da demandoj pri la organiza stato de la societoj, ties kulturkleriga agado, la abonado al „Bulgara Esperantisto“, la varbado por UEA ka.

La estraroj de la suprenomitaj societoj prave kritikis la Centran Komitaton kaj la kancelarian de la Asocio, ke ili neregule kontaktigas kun la lokaj societoj, ne ĉiam respondas al iliaj

leteroj kaj ne plenumas ĝustatempe iliajn petojn.

En Stanke Dimitrov kaj Kjustendil k-do Lakov prelegis antaŭ la lokaj esperantistoj pri la esperanta poezio. La 15-an de marto dum kunveno de la esperantistoj en Blagoevgrad la malnova Esperanto-pioniro Ivan H. Krestanov rakontis rememorojn pri L. L. Zamenhof kaj pri la unua periodo de la Esperanto-movado en nia lando. K-do Lakov parolis pri la organizo de la nacia Esperanto-kongreso, kiu okazos dum julio en Burgas. Samtempe li respondis al multaj demandoj de la lokaj esperantistoj.

TRA LA GAZETARO

„SLIVENSKO DELO“ — propaganda artikolo „Esperanto kaj la paco“ de G. Markov, kun portreto de L. L. Zamenhof.

„SEPTEMVRI“ — Stara Zagora (26. XII. 1961) — artikoleto de Iv. Zahariev — „Esperanto servas al la paco“ — informo pri la varia porpaca agado de la esperantistoj en urbo Kazanlāk.

„HASKOVSKA TRIBUNO“ — (26. XII. 1961) — artikoleto de Ĵeko Zaprianov — „Ĉiam pli da esperantistoj“ kun ilustraĵo — informo pri la diversflanka laboro de la esperantista societo „Flamo“ ĉe la kemia uzino en urbo Dimitrovgrad.

„NARODEN DRUGAR“ — Jambol (6. I. 1962) — „Laŭ ĝusta vojo“ — informo pri la jarkunveno de la esperantista societo „Maksim Gorkij“ en Jambol je 24. XII. 1961.

„NARODNO DELO“ en Varna — (12. I. 1962) — anonco en la kroniko pri la jarkunveno de la esperantista

societo „Albatro“ en Varna — artikoleto de A. Kerkin — „La esperantistoj raportas pri sia agado“ en numero de 19. I. 1962 j. — raporto pri la jarkunveno, okazinta je la 14 de januaro 1962.

„OTEĈESTVEN GLAS“ — Plovdiv (16. I. 1962) — artikolo de Kr. Sofroniev „60 jaroj da Esperanto-movado en Plovdiv“.

„ORJAHOVSKA TRIBUNA en Orjahovo (18. I. 1962) — artikoleto de N. Kosev — „Trimonata kurso de Esperanto“ — pri la kurso malfermata por renkontiĝo de fremdlandaj gastoj al la komplekso-restadejo „Arĝenta bordo“ kaj al insulo „Esperanto“ apud Orjahovo.

„LUDOGORSKA PRAVDA“ en urbo Razgrad (24. I. 1962) oni publikigas la leteron de la sveda esperantisto Karl Kvist, kiu gastis al nia lando. La letero estas ilustrita per tre bela ilustraĵo — renkontiĝo de la svedaj geesperantistoj kun la bulgaraj en urbo Razgrad.



Rego	(R)
Damo	(D)
Turo	(T)
Çevalo	(Ç)
Oficiro	(O)
Peono	—

**FOTO | KONKURSO
EKSPOZICIO**

Problemo 1

GIGANTA TURO EN USSR

La pinto de la turo klinigados je distanco de 5—6 metroj kaj ĉe tempesto ĝis 17 metroj.



FRANCIO

Ĉiulandaj radioamatoroj, kontaktigu kun radioamatora stacio esperantista F9ED. Skribu al: Henri Chaisnot, 28 rue Marechal Foch, Orleans (Loiret).

JUGOSLAVIO

Esperantista Junulara Grupo — pri ĉt. Adreso: Terazije 42, Beograd.

POLLANDO

Maria Jagiello, ul. Styczynskiego 37, Gliwice — kun ĉl pri literaturo, historio kaj turismo.

Filipiak Roman, Strzemieszyce, ul. 1-go Maja 32, Woj. Katowice, pow. Bedzin.

USSR

Kuracisto Leon Starodub, Vuzka 3 m. 1, Ujgorod, Ukraina SSR — pri ĉt.

Viktor Nazarenko (inĝeniero, 23-jara), ul. Gorkij 124, k. 334, Donbask 2, Ukrainio — kun spertaj e-istoj el ĉl pri E-movado kaj instruado; Pl, insignoj, libroj.

Elmar Luppe, Uus 24—4, Järvakandi Tehased, Estonio — kun ĉl; PM.

Evgenij Hohor, ul. Krivonos 7, kv. 38, p. Sosnovka (Labuŝkij r-n Lvovskaja obl.), Ukraina SSR — kun ĉl; L, Pl, PM.

Fino Tatjana Ovsjankina (inĝeniero de ŝakto), ul. 1 Maja 1, kv. 25, p. Sosnovka (Labuŝkij r-n, Lvovskaja obl.), Ukraina SSR — kun ĉl; L, Pl, PM.

Mihail Ponjatovskij, ul. Kozaka 16a, kv. 5, Lvov, Ukraina SSR — kun ĉl; Pl, PM.

Aleksandr Al. Jezevskij, ul. Iv. Franko 10, Sokal (Lvovskaja obl.), Ukraina SSR — kun ĉl; Pl, PM; dez. ricevi „Medicina Revuo“ el Teklo kontraŭ neuzitaj PM.

George Aleksandroviĉ Mnuhin (instruistopensiulo, e-isto de 1912, filatelisto de 1910), ul. Sovetskaja 100, Reĉica (Gomelskaja obl.),

BSSR — kun ĉl pri ĉt, precipe pri historio, geografio, turismo kaj kultura vivo; interŝ. PM kun seriozaj kolektantoj.

S-anino Elli Mataité (instruistino), Vaduvos str. 6—3, Vilnius 15, Litovio — pri literaturo, arto, muziko, fremdaj lingvoj, ktp.

ĈEHOSLOVAKIO

Kolektive kaj individue esperantista rondo. Respondo garantiata. Adreso: ZVVZ Liberec—Vesec, Aerteknikaj ekipaĵuzinoj. Uzina esperantista rondeto.

RUMANIO

Raducanu Suzana, str. Stroe Postelnicu 11, Bukureŝto 30, kun ĉl, pri ĉt.

Barbu Angela, str. Bogdan Hasdeu 12, et. I, ap. 3, Bukureŝto 5, kun ĉl, pri ĉt.

Radu Ana, str. Caporal Bulgea 8, r. 1 Mai, Bukureŝto, kun ĉl, pri ĉt.

Becca Eleonora, filologia studentino, str. Academici 7, Bukureŝto, kun ĉl, pri ĉt.

Matei Traian, str. Szaba Arpad 12, Cluj.

USSR

Krivoj Rog 26, do vostrebovanija, (24-jaraĝa majstro de konstruejo), Lisiĉnij Ivan Ivanoviĉ kaj Stepanovis Vasilij Vasiljeviĉ, elektristoaltvoltisto, pri ĉt, kun ĉl.

Anhimikov Eduardo Spasska poŝto Nekouzskaja, Jaroslavskaja obl, pri ĉt, kun Suda Ameriko, Okcidenta Eŭropo, Vjetnamio, Afrikaj landoj.

BULGARIO

Sava St. Njagolov, III-v kurso, Smesen Ikonmiĉeski Teknikum, Sofio, kun gejunuloj el Germanio, USSR, Ameriko, Francio, Italio kaj Arabaj landoj.

Petko Niĉev, bld. Patriarh Evtimij 67, Sofio, oficisto, 42-jaraĝa, kun ĉl, pri ĉt.

Nikola Hr. Karaĝinov Ŝiroki Dol. distrikto Sofio, kun ĉl, pri ĉt.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktorc), Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: P. Ĉ. Georgieva **Adreso de la redakcio:** Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01



Esperanto-poŝtmarkoj

Ĉiuj al la kongreso
en Burgas!

14—16. VII. 1962

